# BONA ESPERO



*Cirkulero 50*
por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.
prezidanto: Otto Nelken,
Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, Tel.: 02902/57460
retadreso: u.nelken@t-online.de

Warstein, 98-09-19

Karaj amikoj kaj subtenantoj,

la plej grava antaŭ ĉio ! Ni daŭrigas!!! En la lastaj semajnoj ni povis varbi jam 5 /!) novajn membrojn. Je la 6a de septembro 1998 la 12 ĉeestantaj membroj post detala diskuto pri la poro kaj kontraŭo decidis kun klara plimulto, ne dissolvi la subtenan organizon kaj plu subteni Bonan Esperon (Brazilo) kun ĝiaj helpbezonaj infanoj kaj junuloj.
Sekve de tio estis elektita el la ĉeestantaj membroj nova estraro. Ĉi-tie mallonga prezentado de la novaj estrarmembroj:
- *prezidanto*: Otto Nelken el Warstein, 64 j., emerita instruisto, ekde 1996 entuziasma esperantisto
- *vicprezidanto*: Bernd Schönberner el Meschede, 52 j., instruisto, anstataŭanto ankaŭ jam en la lasta estraro, konata al la plej multaj ‚subtenas la organizon tre efike kiel magiisto „Don Espero"
- *kasistino*: Brigitte Löffler el Bestwig, 43 j., vendistino, ekde multaj jaroj aktiva en la Esperanto-Klubo Meschede
- *sekretariino*: Uschi Teuteberg-Nelken el Warstein, 45 j., sociallaboristino, edzino de Otto Nelken kaj ankaŭ esperantistino ekde 1996

Ĉar ĉiuj novaj estrarmembroj loĝas en la areo Meschede, estas utile por efika laboro de la estraro, translokigi la sidejon de Münster al Meschede kaj kompreneble aranĝi novan donaco-konton en Meschede. La malnova konto de la organizo unue restos por pli bona transiro. Se vi do volas plu subteni la laboron de Bona Espero per viaj donacoj, ne forgesu ŝanĝi la konton en viaj notoj. La novan konto-numeron kaj la novajn adresojn vi trovos aparte ĉe la fino de la cirkulero. Ni petas vin afable, renovigi vian enkasig-rajtigilon kaj kun subskribo resendi al ni. Poste sufiĉas via informo al la kasistino, se vi ne plu volas enkasigon de via donaco el via konto.
Dum sia ĉi-jara eŭropa vojaĝo la geedzoj Grattapaglia havis kelkajn kontaktojn kun membroj de la nova estraro, tiel kun Bernd Schönberner en Meschede kaj kun la geedzoj Nelken en Montpeliero. Tie oni jam interkonsentis gravajn kondiĉojn por venonta konfidoplena subteno per la subtena organizo kaj por la kunlaborado kun la nova estraro, tiel ke estis farataj bonaj antaŭkondiĉoj por efika rekomenco de la ambaŭflankaj rilatoj. – Krome Uschi kaj Otto Nelken ankoraŭ fine de oktobro dum sudamerika vojaĝo vizitos Bonan Esperon kaj tiel mem provos ricevi aktualan impreson de la tieaj cirkonstancoj. Post ĉi-tiu vojaĝo vi ricevos raporton aŭtentikan pri la situacio tie.

Fine ni kiel nova estraro ŝatas danki tre kore al niaj antaŭuloj pro ilia ĝis nun farita elstara laboro same al ĉiuj membroj, subtenantoj kaj donacintoj pro la ĝis hodiaŭ daŭra materiala kaj idea subteno. Ni petas vin, restu ligataj al nia komuna, bela tasko kaj helpu al ni ĉe la aktiveco por nia komuna celo kiel ĝis nun. Por tio ni promesas, ke ni klopodos per nia tuta forto daŭrigi la sukcesan laboron de la antaŭa estraro, objektive kaj kun nova impeto.

Kiel anstataŭanto por la nova estraro salutas vin la prezidanto

<u>Grava!!!</u>
Bonvolu ĝiri de nun kotizojn kaj donacojn al la nova
**donaco-konto numero 26484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12).**
La adreso de la kasistino :
*Bona Espero e.V., Brigitte Löffler, Zum Loh 9, D-59909 Bestwig, Tel.: 02904 / 6417.*
La adreson de la prezidanto vi povas preni el la leterkapo. Dum la foresto pro nia sudamerika vojaĝo bonvolu kontakti ĝis mezo de novembro la vicprezidanton *Bernd Schönberner, Am Krähenberg 30, D-59872 Meschede, Tel.: 0291 / 82552* kun viaj eventualaj demandoj.